

N. N. 32,

## Burĝonis rozarbedo

*tradukita de Guido Holz*

1. Burĝonis roz-arbedo  
el delikata sin'  
laŭ olda kant-heredo,  
Jiŝaj la origin';  
ekĝermis ĉarma flor'  
dum frosta vintro-tempo  
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,  
mirinda roz-arbed',  
elvenis flor' benata  
laŭ diro de profet'.  
Laŭ sankta Di-ordon'  
ŝi naskis infaneton  
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,  
amindas per parfum';  
la nokton ĝi forpelas  
per sia brila lum',  
nin helpas el mizer',  
el pek' kaj morto savas;  
Li, hom' kaj Di' en ver'.

*Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).*

*Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)*

*Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro "Adoru", n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).*